ISSN:0871-9241

# NiaBulteno

JULIO-SEPTEMBRO 2004 JULHO-SETEMBRO • Numero 85

**Informa Bulteno de Portugala Esperanto-Asocio**
***Boletim Informativo da Associação Portuguesa de Esperanto***

Rua Dr. João Couto, 6-r/cA, PT-1500-239 LISBOA • +351+217141359 • info@esperanto.web.pt • www.esperanto.web.pt

*Dufoje 4 minutojn en la plej spektata portugala TV:*

## SIC sukcesige raportis

pĝ.4







*Komikso prognozas:*

## Futuranoj esperante!

pĝ.8

## Miquel revizitis

*Revenis kelkajn tagojn iama (ankaŭ) Portugalia aktivulo: Gasto inter pluraj.*

pĝ.8

*20-a Renkontiĝo de Portugalaj Esperantistoj:*

## En *Tábua* plaĉe kaj pensige



*Sentabue kaj senprobleme pasis la XX-a. Raporton kaj fotojn sur pĝ. 6,12.*

## Zamenhof-festo 2004



*La lisbona tradicio pri sideja kunmanĝo ne mankis ĉijare: En tre vigla etoso ni festis tutan tagon!*

pĝ.7

**Ne maltrafu: Ĝeneralan Asembleon marte 2005** (pĝ.3)

*Nia Bulteno* (informa bulteno de **Portugala Esperanto-Asocio**)
Numero **85** (jul.-sep. 2004)
ISSN:0871–9241
**Redaktoro:** António Martins-Tuválkin
**Reviziinto:** Werther Sacramento
**Eldonkvanto:** 400 ekzempleroj
Komputile kompostita per *Adobe InDesign*™ 1.6
**Abono (4n-roj, nur ekster PT):** 8-ono de landa MA de UEA
Unuopa ekz. (81-84): 5,00 € (aliajn n-rojn laŭpete);
PDF-e havebla el http://www.esperanto.web.pt/nb.html
**Limdato por *NB*86:** 2005.01.15
**Finkompostita en:** 2004.12.27

***Portugala Esperanto--Asocio***
**Associação Portuguesa de Esperanto**
*(pessoa colectiva de utilidade pública)*

⦿ sabate 15:00-19:00; sideje
✉ Rua Dr. João Couto, 6 r/c A
PT-1500-239 LISBOA
☎ +351 217 141 359 ⌕
☎ +351 217 933 924
✉ ‹info@esperanto.web.pt› aŭ ‹portugala@esperanto.web.pt›
⌂ http://www.esperanto.web.pt/

**Fondita** en 1972.04.25
**Landasocio** de U.E.A. ekde 1979
**K-ano A:** Faria de Bastos
**Membroj:** 101(+76) en 2004.12.27
**Monata kotizo:** 1,50 € (emeritoj kaj sub-18-jaruloj: 1,00 €; malriĉuloj: 0,00 €)
**Aniĝkotizo:** 2,50 €

***Gvidorganoj:*** (ekde 2003.03.29)

***Ĝeneral-Asemblea Stabo:***
**Prezidanto:** José Martins
**Sekretarioj:** Miguel Oliveira
Werther Sacramento

***Estraro:***
**Prezidanto:** Faria de Bastos
**Vicprezidanto:** Martins-Tuválkin
**Sekretario:** Alcino Alves
**Kasisto:** A. da Silva Almeida
**Voĉdonantoj:** Gonçalo Neves
Alexandra G. e Paz
Iuri Gaspar (anst.)

***Kontrol-Komitato:***
**Prezidanto:** Vítor Marques
**Revizoroj:** Francisco Melo
Manuel Ruas

***Rutinas jardekon*** miaj ĉikolumnaj pardonpeto kaj ekskuzo pro malfrua apero de *NB*. Estas de la redaktoro ĉiam sincera rimorsesprimo, sed trafoliumado de antaŭaj numeroj evidentigas la ripeton troa. Prie vantiga admono min skuis okaze de ĵusa tajponteco de ankoraŭ plua tia teksto: Ke tamen *NB* estas bona servo, unu el la malmultaj kiujn P.E.A. provizas, kaj ne hontiga apud la organoj de multe pli potencaj asocioj; ke la redaktoro ne plenumas akurate ne pro maldiligento, sed pro trotaskiteco (eĉ movada); ke doe pardono aŭ pravigo apenaŭ indas, kaj certe ne tiom ofte. Kun bunta novaĵaro, eĉ se nur 12-paĝa, mi tiun admonon resendas al vi, por medito kaŭ kontesto. Ĝis reago (v)ia, salutas via ***red.***

***Neelektitaj Postenoj:***
**Instruado:** (vakas)
**Libro-Servo:** Silva Almeida
**Biblioteko:** Werther Sacramento
**(periodaĵoj)** Wílson Brígido
**(eltondaĵoj)** Martins-Tuválkin
**(sonregistroj)** Carlos Moreira
**(diversaĵoj)** (vakas)
**Fotarkivo:** Olga Almeida
**Subvencioj:** Sandrina Rodrigues
**Ret- kaj komput-aferoj:**
Nuno Magalhães
A. Martins-Tuválkin
Luís Oliveira
**Sidejmastrumo:** Pedrosa Alves

***Lokaj Sekcioj:***
**PLUS — Portugala Loka Unua Sekcio** (nordokcidenta sekcio)
**Repr.:** Nuno Magalhães
**Fond.:** 2002 **Membr.:** 16(+6)
✉ Rua Paulo da Gama, 550-12ºA
PT-4150-589 PORTO
☎ +351 917 721 868
✉ ‹plusanoj@clix.pt›
⌂ http://www.esperanto.web.pt/plus.htm

***Junulara Sekcio:***
**Portugala Esperanto-Junularo**
***Jovens Esperantistas de Portugal***
**Fond.:** 1993 **Membr.:** 20(+10)
(L.S. de TEJO ekde 1996)
⌂ http://www.esperanto.web.pt/pej.htm
✉ ‹pej@esperanto.web.pt›
⦿✉☎: ĉe P.E.A.

***Honoraj Membroj:***
António da Silva Almeida
Alsácia Fontes Machado †
Manuel de Freitas †
Alberto Pedro da Silva †
Adelino Franco Simões †
Manuel de Sousa Teixeira †

***Aliaj Organizoj:***
**Nogeso — Norda Grupo de Esperanto-Studado**
⦿ 1-an dimanĉon de ĉiu monato 21:00; kafejo *Estrela d'Ouro*; str. *Fábrica*; Oporto
✉ ‹esperanto@mail.pt›
⌂ http://www.nogeso.cjb.net/
⦿✉☎: ĉe PLUS
**Saluton! — *Cooperativa dos Amigos do Esperanto e da Natureza***
⦿ 2-an dimanĉon de ĉiu monato 15:00; Cacém
✉ Avenida Bissaia Barreto, 2
PT-3360-191 PENACOVA
✉ Rua do Miradouro, 12
PT-2735-300 CACÉM (SNT)

***Landaj Reprezentantoj:***
**U.E.A.:** (vakas)
**ILEI:** João Santos (deleg.)
**E.E.U.:** Faria de Bastos
**TEJO:** Ricardo Toscano (A-kom.)
**ILERA:** Francisco Melo (CT1CGE)
**EJA:** Faria de Bastos
**SAT:** Pedrosa Alves (kotizp.)
**IKEK:** Alcino Alves
**IKUE:** Salete dos Santos
**L.S.G.:** (vakas)

INFORMADO:

# *Expolíngua*

Apud aliaj ĉijaraj sukcesoj ĉifakaj (vd. ekz. pĝ. 4) kontrastas la fiasko pri *Expolíngua'04* — nature taŭga forumo por nia afero, kie tamen ni laste aperis en 1996, kaj sensukcese de tiam klopodas pri subvencioj. Ĉu reveno en 2005? *AMT*

ARANĜOJ:

# *Xana & Rut ISis*

La mitan novjaran renkontiĝon de Germana Esperanto-Junularo, **Internacian Seminarion**, neniu portugalo ĉeestis jam de 1995. Ĉijare eĉ du, Rut kaj Xana, kiuj raportos en *NB***86**. *AMT*

### *Assembleia Geral dos sócios da Associação Portuguesa de Esperanto:*

# *Convocatória*

Nos termos do artº 22º dos estatutos desta Associação, convoco a Assembleia Geral para reunir em sessão ordinária, no próximo 19 (dezanove) de Março, sábado, pelas quinze horas, na sede social da mesma, sita no rés-do-chão «A» do número 6 (seis) da Rua Dr. João Couto, ao Calhariz de Benfica, Lisboa, com a seguinte ordem de trabalhos:

**1)** Apreciação e votação do **Relatório e Contas** referentes ao ano de 2002, ouvido o parecer do Conselho Fiscal;
**2)** eleição dos **corpos gerentes** para o mandato 2005-2006;
**3)** apreciação e votação de uma proposta de aumento da quotização-base para 24,00 € por ano.

Convoco desde já a Assembleia Geral para reunir trinta minutos mais tarde, no mesmo local, se à hora marcada não se formar quórum.

Lisboa, 20 de Novembro de 2003

O Presidente da Mesa,

***Prof.-Dr. José Manuel Gaspar Martins***

INFORMADO:

# *Agad' transmonte*

Okazis la 14-an de Junio lernjarfina kultursesio en la bazlernejo de *Izeda* (mun. *Bragança*), kie esperanto grave rolis: Krom la kutima P.E.A.-ekspozicio, kun gazetoj, libroj kaj informpaneloj (vd. pĝ. 5 kaj *NB***84**:6), prezentiĝis teatraĵo en esperanto, preparita dum la semestro de plena dekkvino da lernantoj, gvidataj de instruisto D-ro João José Santos — antaŭe tre aktiva en la lisbona (kaj tutlanda) movado.

Same laŭ iniciato de João Santos, la ekspozicio, post tuttaga montriĝo, migris al *Bragança*, kie ĝi restis tri semajnojn en halo de *Mercado Municipal* (kun apogo de la loka municipestraro). Munton kaj transporton de la materialo prizorgis ankaŭ loka esperantisto Isabel Coelho, kaj vojaĝintaj (el Oporto) Nuno Magalhães, Alexandra Paz kaj (el Lisbono) A. Martins-Tuválkin kun ties filino Marta.

El tiu ĉi (unua) agado rezultos esperemble movada vigliĝo en la nordorienta regiono. *AMT*

INFORMADO:

# *SIC sukcesige raportas*

***Miloj ekaŭdis pri ni: Dufoje kvar minutojn pri esperanto en la plej spektata portugalia TV-a novaĵprogramo!***




SIC

La 26-an de oktobro elsendiĝis en portugalia televidkanalo *SIC* programero pri esperanto, kadre de la du ĉefaj noticprogramoj. *SIC* estas neŝtata herca liberriceva kanalo, kutime la plej spektata en la lando, kaj tiu ĉi publikiĝo multe videbligis esperanton en Portugalio.

Spontana kontakto de ĵurnalistino Marisa Antunes venis septembre al Portugala Esperanto-Asocio kaj la 16-an de oktobro finfine okazis intervjuaro filmita dum du horoj en ties sidejo.

Estis intervjuitaj (laŭorde) A. Martins-Tuválkin, Faria de Bastos, Hugo Lourenço kaj Werther Sacramento. Krome aperas mallonge Iuri Gaspar, Irina Tuvalkina, Marta T. Martins kaj Wílson Brígido — ĉi-lastaj du en dialoga situacio.

La elsendo okazis kadre de *Jornal da Tarde*, tuttage en la samentreprena kabla kanalo *SIC-Notícias*, kaj en la vespera *Jornal da Noite* — plenigante la kutiman "sen" rubrikon de la *SIC-noticaroj*. Krome okazis aludo al ĝi dum la matena *Jornal das Dez*.

Laŭplane la fina peco daŭrus 2'30 minutojn, sed «pro nekutima intereso» oni aprobis muntaĵon kun pli ol 4'00. Eĉ tiel restis netuŝita kroma temo, Pasporta Servo, al kiu la ĵurnalisto volis originale dediĉi duonon de la programero. Pro la neatendita "denseco" de nia afero, estis decidite prinotici Pasportan Servon en posta intervjuo, kiu profitos Kristnaskan hejmĉeeston de oftaj PS-uzintoj el la portugaldevena esperantista "diasporo".

Enestas en la elsendita peco iom da eraroj, kaj certe multo restis ne menciita (aŭ, fakte, formuntita), sed temas pri supermezure ĝusta, trafa kaj taŭga elsendaĵo.

Rezulte de ĝi venis al Portugala Esperanto-Asocio tre multaj informpetoj, el kiuj rezultis eĉ kvin membriĝoj. La nombro de konataj eklernintoj ankaŭ kreskis, same kiel tiu de vizitantoj al nia paĝaro: 1489 en la unuaj 24 horoj, dum la kutimo estas ĉ. 30. Tiu nombro restis nekutime alta dum pluraj tagoj kaj kvin semajnojn poste ankoraŭ superis la antaŭan averaĝon. ***AMT***

INSTRUADO:

# *Instruisto serĉata*

Ree en 2005 okazos baznivela esperanto-kurso en la lisbona mezlernejo *Camões* (vd. *NB***80**:8), laŭ iniciato de tiea instruisto Wílson Brígido. Plue oni akceptos kiel kursanojn ankaŭ nelernejanojn. Necesas nun instruisto libera du fojojn semajne, en 2005.02-05; interesatoj kontaktu la Asocion. *AMT*

---

INSTRUADO:

# *Salutinda elano*

La kultura akademio de Kooperativo "Saluton!" (Rua Pascoal de Melo, 84-1º d.to, en Lisbono) ree en 2004/05 ofertas ekde oktobro kursojn de esperanto, en du niveloj. Instruas la duan M. Eusébio dos Santos (pasintjare: Olga Almeida) kaj la unuan Eduardo Crispim (antaŭe: Gonçalves Pires). Tiuj kaj aliaj esperantistaj kooperativanoj organizas rondon kiu kunvenas ĉiumarde en la sama ejo: **ARE**, *Amikeca Rondo per/por Esperanto*. *AMT+MES*

---

EKSTERA MOVADO:

# *Okulo maldekstra*

Werther Sacramento, sendispute la plej aĝa aktiva esperantisto en Portugalio, modernisme plektas esperanton kaj la "eksteran mondon" en sian agadon: Liaj tradukoj de kronikoj pri la socia kaj ekonomika situacio en niaj lando kaj mondo ekaperadis en *Laŭte* (ekde n-ro 173) — temas ĉefe pri tekstoj aperintaj originale en partipolitika portugala gazetaro. *AMT*

---

INFORMADO:

# *"E-pidemio" en la nokt' oporta*

Iniciate de Alexandra Paz kaj Nuno Magalhães (reprezente de la loka sekcio PLUS), la panela ekspozicio de P.E.A. (vd. pĝ. 3) montriĝis en 2004.10.10-31 en salono de la konata oporta amuz- kaj kultur-centro ***Espaço ContagiArte***. Tiu evento kaptis konsiderindan atenton flanke de la kutima publiko — junaj "alternativstilaj" noktemuloj. Baznivela kurso de esperanto, simila al diversaj aliaj kursoj kiuj okazas dumtage en *ContagiArte*, estas konsiderata. *AMT*

---

LOKA MOVADO:

# *Brago breten*

Ne plu aperas en la kolofono (pĝ.2) mencio pri la loka agado en Brago. Efektive la anoncitaj kafejkunvenoj (vd. *NB***81**:5) estas tute ĉesintaj jam iom longe, pro "trankviliĝo" de la loka entuziasmo de 2002. Tiu ĉi nova situacio similigas Bragon, kie loĝas du niaj membroj kaj ses ne membriĝintaj komencintoj, al pluraj mezgrandaj portugaliaj urboj kie esperantistoj ekzistas sed ia ajn agado (eĉ sporadaj renkontiĝoj!) ial ne: Avejro (3 membroj + 5 nemembroj), *Vila Nova de Gaia* (3+5), kaj Koimbro (3+8)*. Tamen, kaj brage kaj aliie, estas kondiĉoj por loka (re)aktiviĝo kaj avide pretas apogo ĉe la asocia estraro. Interesatoj kontaktu por interkontaktigo. *AMT+AGP*

* Nombrojn laŭ municipo.

AMT

ARANĜOJ:

# Esperanto en Tábua

▮ *Alexandra Paz*



Kiel anoncite en *NB* **84**, okazis en *Tábua* la **20-a Renkontiĝo de Portugalaj Esperantistoj**. Kun la loka helpo de Manuel Pinguinha estis organizata programo ne nur plaĉa sed kiu ankaŭ provis esti pripensiga.

La 32 partoprenantoj (mi estis unu el ili) havis la eblecon ĝui prelegojn, promenon, ĥorkantojn, ekskurson, deklamkonkurson (pro kiu Alcino Alves estis premiita) sed ankaŭ interŝanĝis ideojn pri temoj kiaj la rolo de esperanto en Eŭropa Unio kaj la stato kaj celoj de esperanto-movado en Portugalio.

Dum la semajnfino kompreneble ĉiuj ni multe babilis, trovis novajn kaj malnovajn konatojn kaj ĝuis esperanton, espere same okazos venontjare, kiam eble tiuj ne venintaj ĉifoje nin akompanos. ▮



*__1:__ Renkontiĝejapuda kafejteraso. __2:__ Virinoj ne mankis: Olga kaj Xana. __3:__ Ĥorpreparo: Jozefo, Alcino, Vieira. __4:__ Pinguinha kaj Gonçalo tagmanĝe.* (**pliajn:** pĝ.12)





INFORMADO:

# *Gazetaro abunde*

La jaro 2004 ne alportis malpli da gazetara eĥo pri nia afero ol la antaŭaj: Entute registriĝis 15 eltondaĵoj en nia albumo (13 en 2003), al kiuj aldoniĝas po unu televida (vd. pĝ. 4) kaj radiaj pecoj, ambaŭ de konsiderinda vasteco. Tiu lasta, en *Rádio PAL* (de *Palmela*), elsendiĝis komence de la jaro kaj konsistis el ripeto de tre interesa kaj kompleta programo de tiu sama stacio, farita precize dek jarojn pli frue (*NB***64**:3), laŭ iniciato de Alexandre Kasesa. El la **skriba informilaro** atentindas vasta intervjuo (*O Dia*), pozitiva prezento (*LifeCooler*) kaj du negativaj (*Quo* kaj *Superinteressante*), favora legantletero (*DN*), kuntekstaj mencioj (*Mundo do CD-ROM* kaj *Público*) kaj pluraj artikoloj pri la 20-a R.P.E. en la loka gazetaro. Krome, estis du artikoloj pri lingva problemo (en EU kaj ekskolonioj). Nia eltondaĵalbumo konsulteblas sideje; kopiojn laŭpete kaj katalogon en la paĝaro. ***AMT+OA***

ARANĜOJ:

# *Zamenhoffest'04*

Venis al la sidejo dimanĉon la 12-an de decembro kelkaj lisbonaj esperantistoj, alvokitaj al festa tagmanĝo okaze de la 143-a naskiĝdatreveno de Zamenhof, la 15-an de decembro — ankaŭ festata kiel Tago de la Esperanta Literaturo.

Malkiel en pasintaj jaroj, ne okazis sideja kuirado de komuna manĝo: ĉiuj ĉifoje estis petitaj alporti po eron de la manĝo, kio rimarkinde sukcesis. La preparo, organizo kaj ordigo okazis, kiel kutime, danke al la diligento de Alcino Alves. Rimarkindas ankaŭ la multflanka kontribuo de Jaime M. Correia, kiu prizorgis la bakigon de la datrevena torto (malofte oni festas kun tri ciferkandeloj!), alportis ornamilojn kaj manĝilaron, kaj vigligis la etoson per trumpeta akompano de la grupa kantado.

Inter manĝo kaj remanĝo la posttagmezo pasis ankaŭ per babilado, legado kaj videospektado — nome filmaĵojn de la renkontiĝo en Tábua (vd pĝ. 6) kaj la raportfilmon en SIC--televido (vd pĝ. 4).

Malpli abunde ol en antaŭaj jaroj kunvenis en tamen vigla etoso Marta Martins (7), Irina Tuvalkina (8), Alcino Alves (6), Werther Sacramento, Luís Ladeira (2), Pedrosa Alves, Jaime Correia (5) kaj nevo, Artur Oliveira, Luís Duarte (4), Faria de Bastos (3) kaj A. Martins-Tuválkin (1) (laŭ tabla sidordo; numeroj laŭ fota). ***AMT***



IRINA





AMT

MOVADO:

# *Gastoj*

### "Durkapulo" vizite

Iama aktivulo de Germana Esperanto-Junularo kaj de TEJO, valencilanda kataluno **Miquel Gómez i Besòs**, kromnome "Durkapulo", loĝis en Portugalio en 1998 kaj en 2000-2002. Tiam li rolis i.a. kiel estrarano, kunredaktoro de *Nia Bulteno* (**77-79**) kaj eĉ kiel sideja riparisto (*NB***80**: 13). Elektinte Irlandon kiel pluan adoptlandon antaŭ duonjaro, jen li revenis al Lisbono la duan semajnon de decembro 2004 (gaste ĉe familio Martins-Tuvalkina) pro profesiaj aferoj. Tio ne malhelpis viziton al la sidejo.

### Polo markis

Septembre Werther Sacramento gastigis polan leteramikon, **Marek Bamberski**, kiu (pli verve ol afable) montris intereson iam regasti nialande…

### Venoj kaj misrenkontoj

Vizitis Lisbonon somere plia juna konata kataluna aktivulo, **Lluis García**. Kontakto kaj sidejvizito bedaŭrinde ne eblis kaj apenaŭ ne okazis same decembre al serbino **Rosa Pavlović**. Vizitis krome dano **Bent Jensenius** (julie) kaj geparo **Almir** kaj **Zilda Ferreira**, el Brazilo (oktobre). Dume, danke al Pedrosa Alves, la asocia gastlibro estas nun digne videbla en sideja tablo. *AMT*

JOSÉ RUY




INFORMADO:


# *Futuranoj esperantlingvaj en portugala komikso*

La komiksa libro *A Ilha do Futuro* (ISBN:972-45-1753-5), ekvendiĝis oktobre, distribuata de *Meribérica*. Ĝia aŭtoro estas José Ruy, dojeno de la portugalaj ilustristoj, en kies biografio listas dekoj da tiaj libroj.

Temas pri retronaiva sciencfikcia rakonto, taŭga por frudekjaruloj, kie rolas i.a. sekreta mondsava internacia komunumo de sciencistoj, kies komunlingvo estas ja esperanto. La intrigo okazas en la jaroj 2090 kaj 2100 kaj ĉefrolas geparo da tiamaj portugaloj. Originale komisiita por *Expo'98*, la eldonon oni devis tamen prokrasti ĝis ĵus, nun normala komerca elpaŝo, sed graveco de la oceanoj por la monda estonto restis kiel ĉefa temo.

Esperanto aperis tie kiel «natura elekto sine de klera kaj bonfarema plurlingva komunumo» — tiel la aŭtoro motivigis la uzon de esperanto en pluraj dialogoj, pri kiu estas danko al kap. Almeida kaj al P.E.A. en la lastpaĝa kolofono. Malgraŭe ne mankas tie strangaĵoj kaj eĉ eraroj, bedaŭrinde, kvankam rezulte de tiu ĉi verko la atenta legantaro (ĉefe junuloj kun "mondsava bonintenco") ricevas pri esperanto impreson pozitivan kaj estontportan.

(Okaze de la oficiala inaŭguro, A. Martins-Tuválkin, esperantisto kaj sciencfikciemulo, laŭpete laŭtlegis partojn, kaj P.E.A.-sekretario Alcino Alves ricevis de la aŭtoro dediĉitan ekzempleron.) *AMT*




AMT

BIBLIOTEKO:

# *Periodaĵoj ordiĝas!*

Jam tro longe la periodaĵa sekcio de nia biblioteko restis en stifaj manoj, parte prizorgata de la estrara sekretario (Alcino Alves) kaj de la bultena redaktoro (A. Martins-Tuválkin), kiel eta parto de ties taskaro: Depost la bibliotekisteco de Gonçalves Pires (1982-1988), liaj posteuloj (Gonçalo Neves, en 1988-1991, kaj Werther Sacramento, post 1993) prave devis prioritatigi la libran sekcion, pro duma kresko de ties volumeno.

Rezulte, akumuliĝis skatole kaj stake en diversaj partoj de la sidejo miloj da ekzempleroj de multaj periodaĵoj, rezulte de kelkaj heredaĵoj kaj de la bultenaj interŝanĝoj — kaj eĉ se sen troa malordo nek eĉ misordo, certe regis disordo. Tion solvi celis longa serĉo pri aparta periodaĵa bibliotekisto (vd. ekz. *NB***57**:2) — preter la dumaj mallongaj postentenoj de Ricardo Toscano (1993-1996) kaj Susie Carvalho (1995), kiuj povis plenumi nur la rutinan prizorgon —, kiu finis en 2003.10 per la enpostenigo de Wílson Brígido, kiu dum 2004 okupiĝadis per planado de la necesa taskaro kaj inventaro de spacoj kaj havaĵoj.

Signifa (kaj finfine videbla) stadiŝanĝo okazis la 7-an de novembro, kiam la tuta kolekto estis dissternita sur tablegon kaj ekreordigita, je vasta operacio kiu mobilizis plurajn helpantojn (inkl. Nuno Magalhães kaj Alexandra Paz, ekspresе venintaj el Oporto!), laŭ alfabeta ordo de titoloj. Poste, en fazo kiu daŭras plu, ordigo laŭ numero ene de ĉiu titolo.

Rezulte estos apartigo de duoblaĵoj (kiujn eblos poste donaci aŭ integrigi en konstantan ekspozicion), detala komputila (kaj rete konsultebla) arkivo, kaj fizika dismeto ebliganta facilan konsulton — kio laŭplane estos plene atingita komence de 2006.

Jam nun, eblas nur diri ke nia periodaĵa biblioteko enhavas ĉ. 26 metrojn (15 en 1992!) da esperantlingvaj kaj priesperantaj gazetoj (neinkl. grandkvantajn restaĵojn de *Nia Bulteno* kaj de *Revista Portuguesa de Esperanto*, aparte ordigitaj). Klasifikitaj titoloj (da kiuj ekzistas almenaŭ unu ekz.) estas 384, kio estas verŝajne tri kvaronoj de la totalo.

Kvankam dume do estas plu ne facile konsulti precizan numeron de plej multaj titoloj (ordon plene nur en titoloj "A" ĝis "D"), eblas en la sideja saloneto foliumi po unu ekzempleron de ĉiu periodaĵo interŝanĝata kontraŭ *Nia Bulteno*, ĉ. 40 malsamaj titoloj en konstanta renoviĝo (vd. foton). Kaj cetere la bibliotekisto certe plu bezonas volontulan helpon! ***AMT+WB***

NEKROLOGO:

# *Pedro da Costa (1920-1996)*

Per poŝtoficeja informo ni eksciis frue en 2004 pri la forpaso de Pedro da Costa, malnova esperantisto kiu jam en la piknikoj de la jaroj 30 kaj 40 askultigis al la samideanar' siajn «elstare malfuŝajn» versaĵojn, laŭ atesto de samtempano. Longe loĝis li en Lisbono kaj poste en *Sabugo* (mun. *Sintra*); je emeritiĝo li revenis al sia naskiĝvilaĝo *Salgueirais* (mun. *Celorico da Beira*), estante lasttempe la sola asociano en la tuta regiono Interna Rando. Post vana klopodo, lian mortdaton ni supozas eĉ 1996, surbaze de lia ĝis tiam akurata, eĉ se ne senofera, kotizpago. ***AMT+WS***

NEKROLOGO:

# *Álvaro Soares (1919-1999)*

Lisbona advokato, lasttempe emerita, ne perdis intereson pri esperanto, malgraŭ intensa profesia vivo. ***AA***

NEKROLOGO:

# *F.º A.º Rebêlo (1909-1997)*

(R.R.)



Nur ĵus, per informo edzina, ni eksciis pri la forpaso de Fernando António Rebêlo, okazinta en junio 1997. Maljuna sed relative nova esperantisto, li estis unu el la lernintoj de la 1989-a kurso ***AMT***

NEKROLOGO:

# *Judite Figueiredo (1916-2004)*

Neforgeseblas la gajo kaj ĝentilo de s-ino "J.J.": Unu el la plej sukcesaj lernintoj de la *UITI*-kursoj, ŝi regule partoprenis esperantajn aranĝoj. Ankaŭ ŝia frato Fernando (1912-1992, vd *NB***59**:9) estis esperantisto. ***AMT***

NEKROLOGO:

# *José Marques (1920-2004)*

Laŭ informo en *Sennaciulo*, forpasis septembre José do Nascimento Marques, malnova portugala esperantisto jam de 40 jaroj ekloĝinta en Argentinio. Tiu malproksimo ne malligis lian rilaton kun la portugala movado: Pluraj liaj tekstoj, ĉefe pri movadhistorio de sia tiama urbeto *Barreiro*, aperis en *NB*. Restas la memoro pri verva, malavara homo. ***AMT+WS***

# ✉ Leter ✍ Amikoj

■ *A. S. Almeida (kompil.)*

---

Knabino 16-jara, vigla, amanta la vivon, interesiĝas pri filozofio, poezio, literaturo, kaj lingvoj. Deziras korespondi kaj (eble) eĉ gastigi.

**Krystyna Hawlena**
✉ Ul. Cisowa 18
PL-30-229 KRAKÓW
Polónia
💻 krinjo@poczta.fm

---

38-jara profilaktikmedicinisto interesiĝas pri Portugalio kaj volas korespondi.

**Felix Shkolnik**
✉ POB 10238
IL-84002 BE'ER-SHEVA
Israel
💻 felixsh@hotmail.com

---

Franca samideano deziras korespondi kun gesamideanoj de *Coimbra*, ĝemelita kun lia urbo *Poitiers*.

**Jean Grimaud**
✉ Esperanto-Poitiers
891 Route des Colombiers
FR-00000 MIGDALOUX-BEAUVOIR
França

---

Treege atendas leterojn de geesperantistoj de diversa aĝo: Galina Kononova (13j), Anna Belâeva (16j), Andreĭ Sisoev (13j). Sendu unuan leteron al:

**Valeriĭ Maliqin (klubestro)**
✉ ab. âŝ. 24847
RU-660133 KRASNOÂRSK
Rússia
💻 sapphire@ns.kgtu.runnet.ru

---

Pola inĝeniero deziras korespondi pri Portugalio kaj filatelo.

**Jeray Michałski**
✉ Konopnickiej 25,
PL-26-660 JEDLINSK
Polónia

---

Brazila 22-jara Biologistudentino deziras korespondi por pligrandigi sian amikaron kaj paroli pri ĉiaj aferoj.

**Danielle Pocirga**
💻 pocirga@yahoo.com.br

---

Deziras korespondi kun geportugaloj matura lingvinstruisto, ankaŭ interesata pri interŝanĝo de kolekteblaĵoj.

**Mpill Xulidis**
✉ Klafþmonos 3
GR-546 34 ÞESSALONIKI
Grécia

---

22-jara oficisto de la Asocio Venezuela de Esperanto lernas esperanton kaj historion; deziras korespondi.

**Ricardo Coutinho**
💻 vesperto@cantv.net

---

En centra Francio, du 14-jaraj knabinoj, komencantinoj, deziras korespondi kun samaĝaj portugalaj gejunuloj.

**Raymond Raurich (intruisto)**
✉ Lieu dit "Dometo"
La Forêt
FR-36310 Chaillac
França
💻 raymond.raurich@wanadoo.fr

---

Peras por siaj junaj membroj korespondpetojn de turismemuloj **loka faka klubo** de Kuba E-Asocio:
💻 hasta@agitpro.cu









***5:** Promenreveno, la plej junaj: Spunko, Xana, Marta, Hugo. **6:** Vespere, Pedrosa kaj Wílson. **7:** Prelego: Xana kaj Pedrosa. **8:** Ekskurso: Artur, F. Costa, Jaime.* ***(pĝ. 7)***

REMETENTE:

**Associação Portuguesa de Esperanto**
Rua Dr. João Couto, 6-r/c A
PT-1500-239 LISBOA
PORTUGAL

DESTINATÁRIO:

nº de sócio / *annumero* — últ. quota paga / *lasta kotizpago* — foto / *foto*

laste ricevita
interŝanĝnumero